# LA VOĈO DE AMIKEJO

TRIMONATA INFORMILO PRI ESPERANTO EN EUREGIO MOZO-REJNO

**Senlime**

**Groupe espérantiste de Verviers**

**Avec le soutien de la Fédération Wallonie-Bruxelles**

**En cas de non-distribution, merci de renvoyer à l'éditeur responsable:**
Jean-Marie **Jacques**,
5 rue Joseph Wauters
BE-4800 VERVIERS

**Informations en français**
**Informoj en la franca lingvo:**
Tel. +32-(0)87/33.02.92
Mail: jacques@senlime.org
Esperantista Grupo de Verviers
J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters
BE-4800 VERVIERS

**Informatie in het Nederlands**
**Informoj en la nederlanda:**
Tel. xx-31-(0)43-455.14.36
Mail: parren@senlime.org
P.H.H. Parren, Heimansstr. 16
NL-6285 AM EPEN

**Informationen auf deutsch**
**Informoj en la germana:**
Tel. xx-49-2406-7809
Mail: hogen@senlime.org
K. Hogen, Auf der Pief 22
DE-52134 HERZOGENRATH

**Aperas kvarfoje en jaro kaj rete elŝuteblas ĉe www.senlime.org**

**Prezoj por BE, NL kaj DE :**
**Unuopa n-ro : 4 EUR**
**Jara abono : 12 EUR**

Abono al **papera** versio de nia informilo (12€) eblas sed **NE** enhavas la kotizon al ***Senlime*** (10 €).

Bonvolu pagi prefere antaŭ la jarfino **NUR** al la konto :
**BE41 9795 3271 4810**
BIC : ARSPBE22
(banque: Argenta) de ***Senlime***,
25 rue Pierre Fluche,
4800 VERVIERS, Belgio.

## ENHAVO :

**p. 1: Ĉu *Senlime* mortos dudekdujara?**
**p. 2: Niaj programeroj lupee**
**p. 3: Eŭregiona kalendaro 2014-2015 (2/2)**
**p. 4: Novaĵoj pri Amikejo kaj EMRo**
**p. 5: Tous pour l'espéranto, l'esp-o pour tous!**
**p. 6: *Senlime* informpetas**

**«La Voĉo de Amikejo» [La Voix d'Amikejo] ne paraîtra plus dans «Esperanto en Marche». Si vous souhaitez continuer à le lire, veuillez vous abonner dès à présent ou le télécharger sur notre site internet (http://www.senlime.org/Info/Lasta.pdf)**

Ni ĝojas prezenti al vi niajn bondezirojn por la jaro 2015... kaj nian iom renovigitan informilon «La Voĉo». Ĝi kiel eble plej bone plu informos pri Amikejo sed ja iom post iom translokiĝas al Verviers... Vi certe rimarkis ke en la titolo (intence elvokanta la aspekton de «Heroldo de Esperanto», plej grava informilo pri esperanto datiĝanta de la sama epoko kiel la unua – vera – «Voĉo de Amikejo») pli diskreta estas la aludo al Amikejo. Tiu-ĉi informilo ja estos nun pli Verviersa, ne nur esperantista sed direktita al la eksteruloj.

La unua kunsido de reprezentantoj de Eo-kluboj en la Trilanda Regiono okazis dimanĉon la 31an de januaro 1993 de la 11a horo ĝis la 16a horo kunvoke de Marie DAENEN en Welkenraedt. Krom tiu-ĉi, ankaŭ ĉeestis Mia MARTENS, Annelies SOUREN, Trude SINNO, Mathieu SCHRYMECKER, Wolfgang BIENEN, Jean-Marie JACQUES, Benoit SCHEUREN kaj Uwe-Joachim MORITZ: reprezentantaj esperantistoj el Nederlando, Germanio, Valonio kaj Belgia Limburgo (tio estas de la kvar subregionoj de Eŭregiono Mozo-Rejno). Tiel naskiĝis ***Senlime*** (eĉ se la nomo jam ne estis elektita).

Hodiaŭ la Esperantista Grupo de Verviers plu kunvenas en Kelmis (iama «Amikejo») kaj tiel plu okazigas kunvenojn de ***Senlime*** en la tiea kultur-centro Select (loko plej proksima de la trilanda punkto inter Belgio, Germanio kaj Nederlando). Ve, iom post iom malaperemas ĉiuj reprezentantoj de Nederlando kaj Germanio, kio kompreneble endanĝerigas la pluvivon de tiu simpatia asocio.

La komitato de E.G.V. Sendas lastan(?) inviton al ĉiuj esperantistoj en la trilandlima regiono: de marto ĝis junio okazos kvar interesaj vesper-kunvenoj en Select (Kelmis): kunvenu kun ni! Sen signo pri intereso viaflanke, la Verviersanoj plu kunvenos en Verviers: bedaŭrinde malaperos aŭ almenaŭ pli kaj pli profunde ekdormos la asocio «***Senlime***» (ĝis kiam, eble, intervenos ĉarma princo... sed la Kelmisa karnaval-princo ŝajne ne estas tia)!

# Niaj programeroj lupee

***detaloj pri anoncitaj prelegoj, vesperoj, festoj,…***

## Internacia Festivalo (IF)

Internacia Festivalo ofertas al vi specifan programon por plenkreskuloj kaj familioj (kun aŭ sen infanoj). IF okazas sub profesinivela gvido kaj kunvenigas ĉiujare 100-120 personojn el proksimume 20 landoj.

IF estas aranĝo por lingve spertaj personoj, kono de Esperanto kaj ĝia uzo estas gravaj, sed laŭdezire ni ofertas porkomencantajn kaj/aŭ paroligajn kursojn, ekzemple por via partnero.

Ni proponas varian programon, t.e. matene kaj posttagmeze altnivelaj prelegoj pri la kadra kaj aliaj temoj, kursoj, promenoj kaj tuttaga ekskurso; vespere koncerto, magio kaj danco, silvestraj balo/-bufedo kaj internacia vespero.

Nia programo komenciĝas la 27-an de decembro per la interkona vespermanĝo, programfino la 3-an de januaro post matenmanĝo. La plilongiga tago finiĝas la 4-an de januaro post matenmanĝo.

Ĉi-jare la festivalo okazas en Jülich, proksime de la Trilanda Punkto, kiun ĉ. 30 partoprenantoj vizitos dum la plilongiga tago, gvide de Trude Sinno: foriro la 3an de januaro je la 13h30 buse al Aachen, poste tra Vaals al la trilanda punkto, kaj iom antaŭ la malheliĝo ni daŭrigos al Kelmis.

**01-03** 16h00 Kelmis, Select: vizito de IF-subgrupo (kafo-paŭzo). Pliaj informoj ĉe: HDP@internacia-festivalo.de

## Ĝibraltaro

Ĝibraltaro (angle Gibraltar [ĝibrelta], hispane Gibraltar [ĥibraltar']), estas Dependa Teritorio de Britio en Suda Eŭropo, kaj flug- kaj marbazo ĉe la suda fino de Hispanio, ĉe la Ĝibraltara Markolo.

Strategie grava lokiĝo kiel ponto inter Eŭropo kaj Afriko kaj kiel "ŝlosilejo" en Ĝibraltara markolo inter Atlantiko kaj mediteraneo. Ĝi estas esence granda fortikejoroko traborita de facile defendeblaj tuneloj.

La loĝantaro estas idoj de britoj, hispanoj, maltanoj, ĝenovanoj, marokaj sefardoj, hindianoj kaj aliaj. La oficiala lingvo estas la angla, sed ĝenerale oni ankaŭ parolas hispane andaluzece.

Aliaj enloĝantoj estas la Ĝibraltaraj makakoj, la ununuraj nature sovaĝaj simioj de Eŭropo.

Antaŭe la brita garnizono estis la ĉefa monfonto. Kiam, post Malvarma Milito, la brita armeo malĉefigis la ĝibraltaran bazon, la kolonia registaro decidis igi la landon ejo por internacia bankaro. Ankaŭ la malaltaj tarifoj igas ĝin komercejo por petrolo el kaj al la apuda rafinejo en Algeciras. La "Interkonsento" de la Eŭropa Konsilio de 1990 pri monpurigado ne validas por Ĝibraltaro (tiu fakto estas ofte kritikata)...

**03-20** 20h00 Kelmis, Select: "Ĝibraltaro", prelego de R. **Demarche** (kun projekciado). Inf. lousberg@senlime.org

## Islando

Islando estas vulkana insulo, proksimume 103000 km², en Norda Atlantiko inter Gronlando, Norvegio, Irlando, Skotlando kaj la Feroaj Insuloj. Multloke ĝi estas kovrita de glaciejoj, kaj la nomo de la lando signifas “Glacilando”. La ĉefurbo kaj plej granda urbo estas Rejkjaviko.

Tie okazis en julio 2013 la 98a Universala Kongreso kaj tie ankaŭ vivas unu el la plej grandaj esperantaj poetoj: Baldur Ragnarsson.

Estas ĉirkaŭ 320 000 loĝantoj en Islando, kaj el tiuj ĉirkaŭ 60% loĝas en Rejkjaviko kaj la najbaraj urbetoj. Novaj enmigrantoj en Islando estas 8% de la loĝantaro, la plej multaj el Pollando.

En Islando la vetero tre varias ; tial povas esti racie kunporti akvorezistajn vestojn praktikajn en vento kaj pluvo, precipe rilate al la ekskursoj. En julio la mezaj temperaturoj estas inter 9 ĝis 13 °C. En julio pasas la plej longa tempo inter sunleviĝo kaj sunsubiro, kaj tiam la noktoj estas helaj.

La islanda estas la oficiala lingvo. Multaj kapablas paroli la nordiajn lingvojn (la danan, la norvegan kaj la svedan) kaj la anglan.

La oficiala mono estas la islanda krono.

04-17 20h00 Kelmis, Select: "Islando, tero el fajro kaj glacio", prelego de J. Jacob (+ lumbildoj). Inf. jacques@senlime.org

# ESPERANTO

## Eŭregiona kalendaro 2014-2015 (2/2)

Senlime Esperanto Kalendaro

***Senlime*** publikigas, por siaj membroj, agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eŭregiono Mozo-Rejno. Ĝi aperas rete kaj papere.

« Trilandaj renkontiĝoj » estas organizitaj de kiu ajn esperantisto aŭ esperanto-grupo en Eŭregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de ***Senlime***. Principe ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en ĉiu el la tri landoj (BE, DE, NL).

Tiu-ĉi agendo eventuale povas enhavi programerojn de lokaj grupoj aŭ aktivaĵojn organizitajn aŭ subtenitajn de komitatanoj. Ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de esperanto-aranĝoj (aliaj ekzistas).
La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de ***Senlime*** nun regule okazas ĉiun trian vendredon de monato en kultur-centro "Select", Lutticherstr. 264.

**Por kiu ajn propono pri kunlaboro, ĉiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro**:

**Jean-Marie Jacques (jacques@senlime.org).**

**01-03** 16h00 Kelmis, Select: vizito de IF-subgrupo (kafopaŭzo) gvide de Trude Sinno. Pliaj informoj ĉe: HDP@internacia-festivalo.de

**01-16 Vintra paŭzo** (ni ne kunvenos).

**02-20 Vintra paŭzo** (ni ne kunvenos sed ne forgesu la karnavalon!).

**03-20** 20h00 Kelmis, Select: "Gibraltaro", prelego de Raymond **Demarche** (kun projekciado).
Inf. lousberg@senlime.org

**04-17** 20h00 Kelmis, Select: "Islando, tero el fajro kaj glacio", prelego de José **Jacob** (kun lumbildoj).
Inf. jacques@senlime.org

**05-15** 20h00 Kelmis, Select: "Sub la plej bela ĉielo en la tuta mondo: Sicilio", prelego de Jean-Marie **Jacques** (kun projekciado de filmo).
Inf. jacques@senlime.org

**06-21** 20h00 Kelmis, Select: Karaokeo en esperanto (ĝojo kaj rido garantiitaj!)
Inf. jacques@senlime.org

Pliaj kunvenoj de Esperantista Grupo de Verviers ek de la 18a de septembro 2015.

**01-03** 16h00 Kelmis, Select: visite (pause-café) du «Festival international», guidée par T. Sinno. Plus d'informations: HDP@internacia-festivalo.de

**01-16 Pause hivernale** (nous ne nous réunissons pas).

**02-20 Pause hivernale** (nous ne nous réunissons pas mais n'oubliez pas le carnaval!).

**03-20** 20h00 Kelmis, Select: "Gibraltar", conférence de Raymond **Demarche** (avec projections).
Inf. lousberg@senlime.org

**04-17** 20h00 Kelmis, Select: "Islando, terre de feu et de glace", conférence de José **Jacob** (avec diapositives).
Inf. jacques@senlime.org

**05-15** 20h00 Kelmis, Select: "Sous le plus beau ciel du monde: la Sicile", conférence de Jean-Marie **Jacques** (avec projection de film).
Inf. jacques@senlime.org

**06-21** 20h00 Kelmis, Select: Karaoke en esperanto (joie et rire garantis!)
Inf. jacques@senlime.org

Autres réunions du groupe espérantiste de Verviers à partir du 18 septembre 2015.

# Novaĵoj pri KELMIS-AMIKEJ✪.

(el la ret-informilo de la Yahoo-Grupo «*Amikejo*»)

**Verviers-o**

Ĵaŭdon la 4an de septembro komenciĝis en Verviers nova esperanto kurso (35 X 2 horoj). Ĝi unuafoje estas organizita kunlabore kun la ne-esperantista asocio "Eneo" celanta la malpli junajn personojn (pli ol 50 jaraĝaj). Nune nur 8 personoj (6 maljunuloj kaj du pli junaj) plu partoprenas, en 2 grupoj... Gerda estas malaperanta :-)

La 7an de decembro, la esperanto-grupo de Verviers partoprenis la Zamenhofan feston en Ostendo. Post agrabla babilado en trajno (3 horoj!) ni atingis la ejon kaj kiel kutime ĝuis aperitivon, bonan manĝadon kaj agrablan kantadon en esperanto (sen forgesi la tradician tombolon). Koran dankon al niaj Ostendaj geamikoj kaj ĝis la espereble proksima fojo!

**Kelmis-o**



La urba naĝejo estas komplete rekonstruita kaj alirebla de ĉiuj, inkluzive de handikapituloj. La malnova devis esti detruita pro gravaj akvaj polucioj...

Leterportisto, Mario 1a Ortmann, fariĝis la 65a Karnaval-Princo de KeNeHeMo (Kelmis, Neu-Moresnet, Hergenrath kaj Montzen). Kiel tradicie, per lia elekto komenciĝis la ĉi-jara karnavalo la 11an de novembro je la 11a horo kaj 11 minutoj!



Triobla «Alaf» por la nova karnavala Princo!

Unuvoĉe la urbestraro de Kelmis aprobis projekton por plibeligi la aliron al la lageto de la kazino, fronte al la Select, aliflanke le la Lieĝa ŝoseo. 60 % de la kostoj estos pagitaj de la Valonia Regiono. Jen kiel ĝi fine aspektos:



Post kubano kaj japanano, Kelmis ricevos partoprenantojn de IF. La ĉi-jara IF okazos en germana Jülich, ja en proksimeco de la Trilanda Punkto. Dum la plilongiga tago pli-malpli 30 partoprenantoj (denove) vizitos la limregionon. Plej verŝajne Trude Sinno gvidos la grupon. Tiu-ĉi ekveturos la 3an de januaro je 13.30 h al Vaals kaj la monteto por daŭrigi al Kelmis kaj havi kafopauzon en Select. Jen tio, kion vi vidus, de supre de la turo apud la kvarlanda punkto:



Kvankam Kelmis estas (estis?) al ni aparte simpatia urbeto, ankaŭ ĝi estas trafita de taksada rabio. Tial multaj enloĝantoj havis la malagrablan surprizon ricevi monpunon ĉar ne videblas la doma numero sur la fasado! Samtempe, la aliaj estis trafitaj de nova takso pro la deteno de hundo (24 EUR jare). Verdire ne tro gravas se oni komparas kun Verviers-o, ekzemple, kie mi mem pagu ĉiujare pli ol 4000 EURojn pro neokupita domo (herede ricevita sed nune neokupebla, nek vendebla nek ludonebla!)...

**Zamenhof-festo 2014**

Ĉar la vetero, en orienta Belgio, foje rezervas al ni malagrablajn surprizojn kaj danĝerajn vojojn, la grupo de Verviers jam de kelkaj jaroj elektas alian lokon por festi la naskiĝ-datrevenon de Ludoviko Zamenhof (15an de decembro 1859) : Ostendo, kie nune okazas unu el la plej bone organizitaj Zamenhof-festoj de Belgio.



Marc Cuffez, prezidanto de la grupo «La Konko» (Ostendo) paroladas.

Aperitivo, fluanta vino, bonega kaj abunda manĝo, riĉa tombolo, kantado k.t.p., kaj precipe varma etoso kaj bonhumoro: nenio mankis! Koran dankon al la organizintoj ! Vidu la filmeton ĉe https://www.youtube.com/watch?v=VCBvii37kCM

# Tous pour l'espéranto
# L'espéranto pour tous... *Senlime !*

***«Les Trois Mousquetaires»*** est un roman d'Alexandre **Dumas** (père), initialement publié en feuilleton (en français) dans le journal ***«Le Siècle»*** de mars à juillet 1844. Il a été édité en volume la même année. Seul le chapitre 5 de celui-ci a été traduit en espéranto et peut être lu gratuitement sur internet à l'adresse: http://web.archive.org/web/20060108032356/http://82.182.30.179/inko/153-4.pdf



José JACOB et Raymond DEMARCHE en studio

Mais les trois mousquetaires dont je veux parler ici ne sont autres que les trois espérantistes Verviétois qui, depuis près de 50 ans, animent le groupe espérantiste de Verviers: José **Jacob** (président), Raymond **Demarche** (trésorier puis vice-président) et Charles **Norga** (autrefois secrétaire).

Comme dans le roman de Dumas, ils ont été rejoints par un un certain Dartagnan, votre serviteur, «nouveau» secrétaire. Si les affectations ont changé, le quatuor est resté mais s'est adjoint un cinquième larron (Didier **Lousberg**, «nouveau» trésorier, dont vous trouvez bien des traces dans ce bulletin).

Ces trois mousquetaires (au service) de l'espéranto sont donc à présent cinq à «militer» dans notre région (pratiquement tout l'est de la Belgique!). Leur devise pourrait être «***Tous pour l'espéranto, l'espéranto pour tous!***»... et comme les mousquetaires, ils n'y vont pas par quatre chemins: ils ne connaissent pas de limite (***Senlime*** signifie «sans limite» et pas seulement «sans frontière»)!

A l'heure où certains pensent que l'espéranto vit (ou survit) maintenant sur internet (et que cela suffit?), il est bon de mettre en avant les avantages de l'action en groupe (ne dit-on pas que l'union fait la force?).

Un groupe espérantiste est évidemment d'abord le lieu idéal pour pratiquer, diffuser et enseigner la langue oralement, tout en s'encourageant mutuellement, ce qu'internet ne permet que plus difficilement. Ce faisant, les membres du groupe se lient progressivement d'amitié.

La pratique de l'espéranto sera évidemment indispensable si le groupe est international et multilingue: c'est la raison pour laquelle le groupe de Verviers a choisi La Calamine, proche des frontières linguistiques, comme lieu de réunion. La présence d'étrangers nous oblige à nous exprimer en espéranto et non en français, habitude qui reste même quand (c'est trop souvent le cas) aucun étranger ne se présente !

Diffuser l'espéranto par internet est tout aussi difficile (sinon plus!) que d'agir en terrain réel... Bien avant le net, le groupe espérantiste de Verviers a diffusé des cours d'espéranto sur des radios libres, avec un certain succès! Mais il faut réaliser l'investissement collectif nécessaire (une émission demandait deux présentateurs et un technicien pendant l'émission, et tout un travail préalable de préparation!).

Enseigner l'espéranto par internet peut être très efficace... si le matériel nécessaire a été mis au point et si les élèves se montrent courageux et persévérants. Est-ce bien fréquent parmi les «zappeurs» de sites? Une très grand partie des visiteurs du site www.lernu.net, dédié à l'étude de l'espéranto, ne font que «trois petits tours et puis s'en vont»...

La présence d'un professeur en chair et en os, ou de tout un groupe, est bien plus motivante...

Jean-Marie **Jacques**

**V**erviersa **A**ngulo

**V**erviersa **E**speranto **G**rupo

# *Senlime* informpetas !

**Comité de V.E.G.:**

Président: J. Jacob
19 Chemin de la Rostibouhaye
4910 POLLEUR (THEUX)
Tél. 087/22.10.79
Trésorier: D. Lousberg
25 Rue Pierre Fluche
4800 VERVIERS
Tél. 087/22.20.30
Secrétaire: J.M. Jacques
5 Rue Joseph Wauters
4800 VERVIERS
Tél. 087/33.02.92

**Assoc. pour l'Espéranto (A.P.E.):**
www.esperanto-wallonie.be
Paul Kerris, secrétaire
103 rue Windt
4850 PLOMBIERES
Tél. 087/39.85.70
paulkerris@skynet.be

## Cotisations

Les espérantistes et sympathisants sont cordialement invités à soutenir notre programme d'action en versant chaque année leur(s) cotisation(s) au compte

**BE41 9795 3271 4810**
BIC : ARSPBE22
(banque: Argenta)

de ***Senlime***, 25 rue Pierre Fluche, 4800 VERVIERS, Belgio.

*Ce bulletin d'information ne sera plus intégré à la revue de APE «Espéranto en marche», qui a choisi de ne plus s'éditer sur papier.*

*La cotisation pour **Senlime** reste fixée à **10 Euros** (+ 12 Euros si vous voulez un abonnement à cette revue sur papier).*

**Indiquez les nom, prénoms et domicile du membre cotisant:**
***«cotisation de.... pour....».***

***D'avance, merci à tous !***

Esceptokaze tiu paĝo, kvankam Verviersa, estas redaktita en esperanto ĉar ĝi adresiĝas al la esperantistoj en la trilanda regiono (proksime de la trilanda punkto BE-DE-NL).

Vi konas nian vidpunkton: estas pli interese kunveni inter esperantistoj malsamlingvaj: tion ni facile povas en trilanda regiono aŭ en plurlingva urbo (ekzemple Bruselo, Eŭropa urbo). Tial, se vi agas por esperanto en la regiono ĉirkaŭ Vaals-kvarlanda punkto (ni kalkulu kun la iama ***Amikejo***), vi povas helpi nin.

Anoncu al ni kiel eble plej frue la kunvenojn kaj agadojn esperantistajn en via loko. Por ni estas pli facile iri al Vaals, Maastricht, Lieĝo ol en Bruselon, Namuron, Karloreĝon k.t.p.

Tiu-ĉi informilo adresiĝas unue al la esperantistoj de la centro de Euregiono Mozo-Rejno sed due (kaj eble plej grave) al la ne-esperantistoj de tiu regiono, kiujn ni ŝatus iom post iom konsciigi pri la problemo de internacia lingvo.

Komuniku do al ni (en esperanto: ni ne ĉiam disponas pri tradukonto!) ankaŭ freŝajn informojn kaj faktojn pri lingvaj problemoj (okazintaj en via loko/lando – precipe se vi loĝas en Nederlando aŭ Germanio!) kiuj laŭ via opinio iel pruvas la taŭgecon de esperanto: tiaj informoj estas plej bona instigilo al la lernado/subteno de esperanto.

Kompreneble ni ankaŭ ŝatus renkonti vin en Kelmis, se tio eblas por vi. Ĉeeste de samideano ne parolanta la francan, la Verviersano nepre devas paroli esperanton... kaj reciproke.

Teknike, vi prefere kontaktu nin per ret-mesaĝo, sufiĉe frue. Ni finpreparos tiun-ĉi informilon ĵus antaŭ jenaj datoj: 10a de decembro, 10a de marto, 10a de junio kaj 10a de septembro. Vi facile povas kompreni ke malutilas modifi tiujn datojn kaj ke foje malnova informo post tro longa tempo ne plu aperigindas.

Reciproke, vi kompreneble bon-volu kiel eble plej vaste transdoni la informojn aperontajn en tiu-ĉi informilo (papere, aŭ rete per la yahoo-grupo Amikejo).

Lasta rimarko: trilandaj renkont-iĝoj (diversspecaj kaj divers-nomaj!) estus bonvenaj, se iuj el vi pretus organizi...

*Ni dankas vin pro via atento kaj viaj respondoj (atenditaj). Kompreneble ni eble devos preterlasi kelkajn se ne restos sufiĉe da liberaj lokoj en la informilo (nepre 6-paĝa!) kaj ni jam antaŭe pardonpetas se via informo iam, ve, estos tial «forgesita».*

*Jean-Marie **Jacques***

***Cette page habituellement francophone contient cette fois un appel à la collaboration des espérantistes du centre de l'Eurégio Meuse-Rhin...***

***Les informations en français reprendront une part plus importante dans nos prochains numéros, destinés entre autres aux débutants.***

***A bientôt!***